

Konkurso per mallongaj filmoj: Esperanto 125-jara

Germana Esperanto-Asocio okazigas konkurson per mallongaj filmoj kun premioj de entute 5000 EUR. Ĉiu povas partopreni, de komencanto ĝis absoluta profesiulo. La sola kriterio estas via kreiveco.

La prezento de la plej bonaj filmoj kaj la transdonado de la premioj okazos la 15an de decembro en Berlino.

Partoprenkondiĉoj

- Ĉiu filmo estu maksimume 5 minutojn longa.
- La rajto pri la muziko por publika prezento devas esti certigita.
- La personoj en la filmo permesis la uzon por publika prezento.
- La filmfaranto garantias per sia subskribo, ke li havas ĉiujn necesajn permesojn kaj rajtojn kaj ke nenijaj rajtoj de aliaj personoj estas lezitaj.
- Post la konkurso la filmoj estos libere prezentablaj por ĉiuj sub la "Creative-Commons-Licence (CC-BY)".

Kio gravas?

Montru al ni, kion la lingvo Esperanto signifas al vi, aŭ montru, kiel oni povas entuziasmigi la homojn pri Esperanto. Ne gravas, kiun lingvon vi uzas aŭ kiujn teknikaĵojn. Ne ekzistas limoj ĉe la interpretado.

Kiu povas partopreni?

Ĉiuj! Amatoraj reĝisoroj, filmŝatantoj, amaskomunikilaj agentejoj por medioj, studentoj kaj kreemaj homoj el la tuta mondo.

Kio estas permesata?

Ĉio! De desegnofilmoj al dokumentantaj filmoj ĝis teatraj filmoj, ĉion ni volonte rigardos. La formato ne havas limojn, de movebla telefono al filmkamero. Ĉiu lingvo de la mondo povas esti uzata.

Kiel partopreni?

- Limdato estas la 30a de septembro 2012.
- Ĉiuj filmoj faritaj en 2012 estas akceptataj.
- Necesas sendi la filmon en kutima teknika formato (ekz. mov, mpeg, avi, DVD).
- Bonvolu ne sendi originalojn ĉar ni poste ne povos resendi ilin.
- Partopreno eblas nur per poŝtaĵo al:

Kurzfilmwettbewerb - Germana Esperanto Asocio
Silberburgstraße 82
70176 Stuttgart
Germanio

Premioj

- Plej bona filmo: €2000
- Plej bona ideo: €1000
- Plej bona filmo en Esperanto: €1000
- Premio de la publiko: €1000

Jura traktado de la rezulto ne eblas. Se Germana Esperanto-Asocio ne ricevos sufiĉe multajn filmetojn, ĝi rezervas al si la rajton, elŝuti ne ĉiun premion.

Ĉu estas pliaj demandoj?

Skribu al kurzfilmwettbewerb@esperanto.de aŭ telefonu al Rainer Kurz +49-163-3873785. Por tradukoj al Esperanto aŭ la germana lingvo Germana Esperanto-Asocio estas je via dispono.

Mallongaj informoj pri Esperanto

Esperanto estis prezentata antaŭ 125 jaroj al la publiko je 1887-07-26 kiel lingvoprojekto. Ek de tiam tiom multaj homoj lernis ĝin kaj per la uzo pli evoluigis ĝin, ke Esperanto hodiaŭ estas aŭtenta lingvo. Jen la historie unua pruvo, ke lingvoj povas esti kreataj.

La uzeblo de Esperanto estas elprovita en ĉiuj komunikaj situacioj, inkluzive la dulingvan edukon kaj skribe en sciencaj kaj literaturaj verkoj. La Esperanto-aŭtoroj formas propran grupon en la mondvasta unuiĝo de verkistoj de la PEN-kluboj.

La fascinon de Esperanto kaŭzas ĉefe ĝia facila lerneblo, kiu helpas ankaŭ al ne-Eŭropanoj. Esperanto-parolantoj spertas komunan sennaciecan identecon kiel lingve egalrajtaj mondĉivitanoj. Aparte de naciaj kaj internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj la plej multa komunikado okazas en la Interreto. Google kaj Facebook havas Esperanto-versiojn, la Esperanto-Vikipedio ampleksas nun proksimume 165.000 artikolojn (la 27a el 285 lingvoj). Pli ol 100.000 homoj registris sin en la Esperanto-instruejo lernu.net.

Rimarkigo: Esperantistoj estas invitataj traduki tiun ĉi dokumenton al aliaj lingvoj. - Salutas Rainer Kurz